

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 170</i>
	Monata Beletro Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994	
Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm		

Hosemo

AL S-RO WANG CHONGFANG

Majuskla giganto, plenumis mem nur vi l'
unikan laboron
Obstine kun ies konfido montrante
vivantan valoron.
Dezerte marŝadis multoble penige vi kiel
kamelo,
En jaroj pasintaj surmare navigis vi kiel
solvelo.

Se vi ne forlasus l' ideon junecan ja kiel
poeton,
Tra l' mondo do via mirinda versaro
ebligus vin fama.
Antaŭen por sankta afero vi forte daŭrigas
l' stafeton.
Meditu ni ĉiuj, do kial eĉ mankas la ĝojo
aklama.

Absurda tragiko eĉ kaŝe okazis en nuna
Ĉinio.
Jubilis pro falsaj aspektoj nur homoj por
sia honoro.
Silente en valo profunda parfumas vi kiel
lilio

Talenton elstaran vi havas, sed restas
postscena suffloro.
Registras ni vin en l' eposon, ke kun l'
Esperanto-misio
Oferas sindone vi ĉion samkiel honesta
pastoro.



Sopiro al s-ro Dai Liming

Foren,
Foren...
Vi kaŝis memoren.
Kiu restos krome
kun mi sola dome?
Medo,
Medo
Kaj velka bukedo.

Vualado

Zhang Shiming

krepusko ja povas vuali vilaĝon
Sed ne la kvakadon de ranoj

neĝego ja povas vuali la mondon
sed ne la scenon printempan

jen tamen mirinda beleco tamen de virino
— neniu kapablas imagi —
dum unu momento
kiun ŝi elmontras
tre tute facile
vualas la tutan homrondon

esperantigis **Laiwei**



La Malsama Birdo

Lesishu

kun nigra plumar' kaj longa vosto
mi malsamas ol vi

sola flugas mi al brila estonteco
 dum vi jam kutimiĝis
 al pogrupo ludo en stratoj
 — paseroj jen vi estas
 solace ankaŭ mi tre emas
 min miksi kun vi are
 sed vi senĉese fipepas tuttage
 mi emas nur eligi
 okazajn pepojn

esperantigis **Laiwei**

Placo

Chen Xiaoxia

en pluv'
 per mia tuta vivo
 mi volas la placon trairi

heligas lampoj la mallumon placan
 mi vidas
 la nudan, fridan haŭton de la placo

la strataj lampoj staras en spaliro
 aspektas kiel la okuloj de karuloj
 intimaj kaj kvietaj, parolpretaj
 ĉu eblus ŝanĝi l' rolojn, mi imagas
 la stratajn lampojn iri hejmen solaj
 dum sur la plac' mi staru
 kun korp' rektigita
 prilumi l' vojon por aliaj.

Kambino ĉe Balustrado

Chen Jianzheng

frumatene nebulo ankoraŭ restadas
 enua aero leviĝas el tero
 sur stratoj troviĝas kurantoj
 sub arboj videblas pensantoj

ŝi, dekkvin- aŭ deksex-jarulo,
 starante apud balustrade

etendas brakparon laŭlarĝe
 jen kvazaŭ fluganta anĝelo

ĉe la balustrado nur alta malpli ol tri
 metrojn
 en blanka jupeto
 kion ŝi priĝuas
 kun la okulparo fermita
 la vento leĝera l' knabinajn orelojn
 karesas
 la birda kantad' plezurigas fascine

la aŭtoj abrupte haltetas ĉi tie
 kaj poste hasteme forkuras
 kiam mi aŭtstiras ĉi tien
 mi ĉion rigardas
 la bela vetero, la bona animstato
 l' aspiro al vivo
 kortuŝas min horojn kaj horojn.

esperantigis **Laiwei**

Plej Grava Afero

Ebudano

Post mia unua kaj lasta rendevuo
 proponita de mia amikino, neeltenebla
 malĝojo ekokupis min. Enĉambriĝinte post
 mia hejmenreveno, mi mute ĵetis min en la
 liton ignorante la ameman saluton de mia kara
 patrino. Ĉe la renkontiĝo kun mia amikino, ŝi
 senpere esprimis sian korinklinon al mi. Mi do
 kontraŭvole fordankis ŝin pretekstante, ke nun
 mi ankoraŭ ne volas ĝeni mian kapon pri tia
 afero. Mi deziras nek edziĝi nek amatiĝi en la
 nuna tempo. Pri la detala kaŭzo mi tenis mian
 buŝon ferma malgraŭ ŝia obstina peto. Mi
 sugestis, ke ni estu ne geamantoj, sed nur
 ordinaraj geamikoj. Mi ankaŭ esprimis mian
 proponon, ke ŝi sin turni al iu alia kaj kun tiu
 fondu feliĉan familion. Tiel kondukis mi tute
 kontraŭ mia volo. Verdire, ni jam geamikiĝis
 multajn jarojn ekde kiam mi instruis anglan
 lingvon. En la konstanta kontakto kaj

interhelpo ŝi jam konkeris mian koron. Tamen mi ne povis ami ŝin, timante, ke ŝi suferos post nia eventuala geedziĝo. Pro la neeldireble malbeninda situacio mi ankoraŭ ne devas revii pri la edziĝo. Antaŭ tiu ĉi renkontiĝo ĉion malagrablan kaŝis la ŝajno, ke mi estas tia, kiaj estas la ordinaraj, tamen tiu neatendita forŝiro de la falsa ŝajno puŝis min multe pli profunden en la malĝoja abismo.

Ĝuste kiam mi kuŝante priploris mian malican sorton, mia patrino tenere vokis min. Venis amiko, ŝuldato de mia patro, por forpreni cent kilogramojn da greno. Mia patro ŝuldis de li cent juanojn kaj donacos tion kiel dankajojn. Pri ĉio ĉi tia mi neniel plu surpriziĝis, ĉar ofte tiel kondukis plej parte de liaj estimataj ŝuldataj. Mi do indiferece pesis la grenon kaj metis la grensakojn sur lian ĉarumon. Ĉe lia afabla adiaŭo, mi revenis en mian ĉambron senvorte.

Post tio, mi deove okupis mian kuŝejon. Mi ne sciis, post kiom longe, min vekis ekfrapo de porfolio kontraŭ muro. Mia patro revenis kaj piede malfermis la pordon. "Ho, vi revenis. Jen varma akvo por lavi al vi la vizaĝon." Milda voĉo de mia patrino. "Kaj hodiaŭ venis Maljuna Li. Li forprenis la grenon."

"Jes, mi jam sciis," fridaj vortoj elflugis tra la lipoj de mia patro. "Ankaŭ mi promesis al Maljuna Wu (Ŭ), ke ni vendos al li la plej grandan arbon en nia korto kontraŭ kvindek juanoj. Eble li venos por dehaki ĝin en la sekvanta semajno."

"Kiom? Kvindek juanoj? Lastmonate oni volis aĉeti ĝin kontraŭ cent sesdek juanoj, sed vi rifuzis opiniante, ke lia oferata sumo estas ankoraŭ tro malalta. Ĉu vi forgesis?"

"Ne. Tion mi memoras. Sed vi scias, ke ni ŝuldas tricent juanojn al li. Li estas tre bonkora, dirante, ke ni ne hastu por redoni ĝin. Ni ja devas danki lin." Anstataŭ redoni, mia patro sciis nur danki, danki kaj danki!

Post momento, mia patrino ekparolis,

"Hodiaŭ venis vendisto de vinagro. Ne havante monon, mi do ŝanĝis kvin kilogramojn da vinagro per du kilogramoj da maizo."

"Kio? Ĉu vi eklernis malŝpari vidante, ke al ni jam ne plu mankas la greno ĉijare? Sen vinagro oni ankaŭ povas manĝi!" Eble la informo de mia patrino ŝokis lin, ke li ekblekis.

"Kio? Kiel ŝparema vi estas! Ni ŝparas, ŝparadas de jaroj. Kiom ni havigis al ni per ŝparado? Neniom krom ŝuldon kaj dankon senĉesajn!" Rebutis mia patrino. Strange, ŝi kuraĝiĝis ekde kiam oni ja ne sciis.

"Haj--" anstataŭ sia kutima furioziĝo, mia patro elspiris longan suspiron kvazaŭ trapikita balono.

Mi kuŝis senmove kun pretendo, ke mi endormiĝis. Sed mi neniel povis elteni kaj malhelpi la aŭdon de miaj oreloj. Kiel bone estus, se mi surdiĝus nenio-aŭdeble! Mi ja bone komprenis, kial li vespiris. Kvazaŭ nemovebla montego, la neniam likvidebla ŝuldo peze premis lin kaj ankaŭ ĉiujn aliajn en nia familio. Foje, dum li estis iom pli bonhumora, mi aludis al li ŝerce: "Laŭ mia memoro, vi ekŝuldis en mia infanaĝo." Sed tamen, li respondis konfese, "Ne, malprave. Mi ekŝuldis ekde mia propra infanaĝo." Kvankam ĉiuj miaj familianoj laboradis diligente kaj elspezis ŝpareme, tamen ĝis nun mi ankaŭ ne sukcesis en elliberiĝo el niaj ŝuldoj. En la mondo ĉiuj ja estas tro bonkoraj kontraŭ la monprunta peto de mia patro. Mi supozis, ke la kaŭzo kuŝas en tio, ke estas multe pli profitdona prunti monon al mia patro ol deponi en bankoj.

Dum miaj pensoj vagadis sencele kaj nehaltigeble, kontraŭ mia volo, murmurado de mia patro kaj klakado de abako rompita mortan silenton. "... kaj du cent... kaj tricent..." Diable! Kiam li fermos sian buŝaĉon! "...kaj...kaj...kvinmil kvarcent dudek! Sume kvinmil kvarcent kaj dudek juanojn ni ankoraŭ ŝuldas. Ankoraŭ tiel multe!" Vespiris mia patro.

